

Novaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: Rudimenta Kurso / Meza Klaso "Dezerto", en kiu oni kunlegas "Tra dezerto kaj praarbaro" / Meza Klaso "Lanti", en kiu oni kunlegas "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo.

HAMA-RONDA VESPERO

majo 19 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705
prelegonto: S-ino Mireille GROSJEAN (Mirejo)
temo: Esperanto-movado en Afriko
enhavo: Mirejo el Svislando, vizitinta nin antaŭ 2 jaroj, denove kunvenas kun ni. El ŝiaj multeflankaj agadoj, ĉi-foje ŝi parolos ĉefe pri la esperanta agado de Benino en afrika kontinento, kiun ŝi helpas. Tie okazis la monda konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en 2008.

junio 16 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705
prelegonto kaj enhavo ankoraŭ serĉataj

julio 21 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705
prelegonto: S-ino DOI Ĉieko
temo: pri HASAGAWA Teru, t.e. Verda Majo
enhavo: Esperantistino HASEGAWA Teru, plumnome Verda Majo, naskiĝis antaŭ 100 jaroj. Ŝi iris en Ĉinion, la landon de sia edzo, kaj tie faris agadon kontraŭ la japana agreso en Ĉinion. La prelegonto revuos ŝian vivon.

LASTATEMPE EN LA KLASOJ

- * Rudimenta kurso komenciĝis en la 21a de aprilo, tamen kun nur 1 kursano. La kurson gvidas s-ro TAZIMA Norio, uzante kiel lernolibron: "Hanako Lernas Esperanton".
- * Meza Klaso 1 havis la lastan lernokunsidon en la 28a de aprilo. Ĝin gvidis s-ino HIROSE Kanae, kaj por 2 jaroj legis pecojn el "Nova Esperanta Krestomatio".
- * Jokohama Salono faras tradukadon unu fojon monate. De marto, ĝi defias la japanan klasikan esearon "Makura-no-soosi".

INTERNACIA FESTO EN AŬTUNO

En la 20a kaj 21a de oktobro, ni partoprenos ekspozicion, kadre de la "Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2012", en la parko "Zoo-no-hana", apud la haveno de Jokohamo. Semajnon poste, nia rondo organizos Rudimentan Kurson, kaj ni esperas, ke la festo estos bona informejo pri la kurso.



■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS

HAMA-RONDA VESPERO en aprilo

apr. 21 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 306

preleginto: S-ino ISIKAWA Tiekō (Eduka Fakto de Japana Esperanto-Instituto)

temo: La lingva ekzamenado laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (t.e. KER-ekzameno)

enhavo: La preleginto klarigis pri la ekzameno, farota ĉe Tokio kaj Osako en la 9a de junio, por la unua fojo en Japanio. Ĝi estas ekzameno en Esperanto, sed farata laŭ kriterio, komuna al multaj eŭropaj lingvoj.



VIDEO PREZENTO DE ESPERANTAJ KANTOJ



S-ro MAKINO Mitsuo, eksinstruisto de muziko en elementa lernejo kaj video-amanto, faris sian 4-an verkon, kiu enhavas scenojn de esperantaj kantoj, kaj prezentis ĝin en la publika prezentado de la videoverkoj de sia video-rondo en la 28a de aprilo, en la Centro por la gubernianoj de Kanagawa. Ĉar la prezento tempe antaŭis niajn sabatajn lernokunsidojn, 7 el ni spektis ĝin. La videoverko en 8 minutoj temis pri la kantado de 2 kantoj paralele en la japana kaj Esperanto, kun klarigo pri Esperanto. La kantoj estas: "Se gaje ĝoje iras ni", tradukita esperanten de KONISI Gaku, kaj "Marŝo Esperanto", originalaĵo de NAKATA Teruo.

ESEO

Kaloĉaja skolo kaj japanaj esperantistoj

SIBAYAMA Zyun'iti

En la 17a de marto, mi parolis japanlingve pri "Kolomano Kalocsay - koloso literatura kaj lingva". En tio mi menciis influon de li kaj lia skolo al japanaj esperantistoj. Tiun parton mi skribas ĉi tie en Esperanto, post ĝenerala resumo.

Kolomano Kalocsay ([kaloĉaj], 1891-1976), kaj samaĝa Julio Baghy ([bagi], 1891-1967), kunredaktis la gazeton "Literatura Mondo" en 1920-aj kaj 1930-aj jaroj. Sed iliaj propraj

stiloj estis malaj. Kalocsay ŝatis neologismojn, dum Baghy ne. Kalocsay, kaj 11 jarojn pli juna Gaston Waringhien ([varengjen], 1901-1991) kunredaktis jenajn manlibrojn: "Parnasa Gvidlibro" kaj "Plena Gramatiko".

Inter la tradukoj de Kalocsay, aperintaj en "Tutmonda Sonoro" kaj klarigitaj en "Parnasa Gvidlibro", estas "utaoj", fiksformaj poemetoj devenintaj de la japana. Ili estas 5-liniaj versaĵoj el 5,7,5,7,7 silaboj, kun 2 rim-paroj,

nome ĉe la linioj 1-4 kaj 2-5 (vidu Bildon a). Ekzemplo: *En ĉiu floro / de ĉi branĉet' florara / estas kaŝita / centobla ama vorto, / ĝin ne malŝatu, kara!*

En Japanio, OSSAKA Kenĵi (1888-1969) verkis libron pri prozodio kaj enkondukis la teorion pri ritmoj kaj rimoj prezentitaj en “Parnasa Gvidlibro”. Li verkis “utaojn” tamen en 4 linioj, antaŭ la Dua Mondomilito. Li pensis, ke oni uzu eŭropstilan version eĉ por traduki japanajn utaojn. Cetere, li ne debutis internacie en “Literatura Mondo”.


En 1958, OSSAKA publikigis eljapanigitan poemaron “505 Elektitaj Poemoj el Mannjoo-ŝuu”. En la antaŭparolo, li kritikas imitemon fari version el 5,7,5,7,7 silaboj, ĉar eĉ tiel farite, la diferenco inter la japana kaj Esperanta ne permesas bonan reprezenton de la originala spirito, kaj pledas por “refandi” la formon. La verko tamen estas intermikso de la ŝajn-tradiciaj imitaĵoj kaj refandaĵoj, t.e. eŭropstilaĵoj. Mi montras ekzemplon de ambaŭ

formoj.


(verso n-ro 6) *Vent' nesezona / trans la monton tiome / forte alspiras: / mi al kara ci dome / ĉiunokte sopiras.* (de Princo de Ikusa)

(verso n-ro 8) *Dum ni atendis ĉe l' haven', / leviĝon ankaŭ de la lun', / nin ekfavoris tajd', nu, sen / bedaŭr' ni ekveturu nun.* (de Princino Nukata)


Post la Dua Mondomilito, MIYAMOTO Masao (1913-1989) debutis internacie, sur “Nica Literatura Revuo”. Li uzis en “El manjoo” en 1971, la 5-linian versaĵon kun nur 1 rim-paro ĉe linioj 2-5 (Bildo b). Al li, 2 rim-paroj estis troaj, ĉar en la japana originalo tute ne estas rimado. Poste en 1980-aj jaroj, li ŝanĝis sian sintenon, kaj la rimparo venis ĉe linioj 3-5 (Bildo c), pli kohera al la japana koncepto de la “supra verso 5,7,7” kaj la “suba verso 7,7”. Ekzemple, traduko el OOTA Mizuho estas: *Mi ekdormiĝis / en granda trist' vespere / el pordo flanka. / Jen vilaĝ' en aŭtuna / vent' kun salik' etblanka.*



Bildo a



Bildo b



Bildo c

BELETRO

Unu pirarbo --- rakonto de Serbio (2)

Vasilij Eroŝenko

Komuna traduko esperanten de Jokohama Salono

原作：ワシリー・エロシェンコ 「一本の梨の木」 (1921)



Parto 2 (laŭ Koyama Takesi)

Iun tagon unu malpurega almozulo vizitis la loĝejon de la tri junuloj. En tiu tago ĝuste la plej aĝa frato gardis la pirarbon.

“Pardonon, bedaŭrinde mi ne povas vivteni eĉ min pro tio, ke mi estas tiel malsana kiel vi vidas. Bonvole donu al mi ion almozan, mi petas.”

“Ho, mi sincere kompatas vin, sed ankaŭ mi estas malriĉulo, kvankam mi treege deziras oferi

al vi ion oferan. Tial mi ne havas donacon... sed... atendu, mi donos unu piron al vi. La pirarbo apartenas al ni tri fratoj kaj mi donacos al vi mian porcion el ni.”

“Mi treege dankas vin pro via komplezo. Do mi ricevos ĝin laŭ viaj komplezaj vortoj.” La almozulo reiris kun granda ĝojo.

En la sekvanta tago kiam la dua frato gardis la loĝejon, unu almozulo denove venis tien.

“Bonvolu doni al mi ion ajn por manĝi, mi petas.”

“Ĉi tiu pirarbo ne estas mia sed de ni tri fratoj. Tamen mi donos al vi unu piron el mia porcio, ĉar vi vizitis min speciale.” Ankaŭ la dua frato tiel diris kaj donacis al li unu piron.

En la tria tago la sama almozulo denove venis al la loĝejo. Tiutage la plej juna frato gardis la loĝejon.

“Mi donacos al vi unu piron el mia porcio.” Ankaŭ la plej juna frato donis unu piron same kiel la aliaj fratoj. Kompreneble la almozulo reiris ĝojege.

En la sekvanta tago nobla pastro vizitis la loĝejon de la tri fratoj.

“Vi tri fratoj estas tre komplezemaj kaj laboremaj. Nu sekvu min ĉiuj tri. Mi trovos pli bonajn laborojn al vi ĉiuj.”

Do la tri fratoj decidis sekvi lin. La pastro kaj la tri fratoj piediris iom da tempo, ili baldaŭ atingis la digon de granda rivero. La bele pura akvo fluis trankvile kaj malrapide kvazaŭ vastega rivero superakvus.

La plej aĝa frato haltis kaj fiksis rigardon sur la fluo de la rivero. Tiam la pastro demandis lin.

“Vi rigardis nur la riveron de antaŭ momentoj. Kion vi pensas? Kian laboron vi deziras?”

La frato, kiu rigardis nur la supraĵojn de la rivero, turnis sin al la pastro trankvile.

“Se ĉi tiu akvo de la rivero estus... vino... kaj... ĉio ci estus mia havaĵo, tio estus tre bona por mi.” Li diris aspirante kvazaŭ monologo.

Aŭskultante ĝin la pastro krucosignis grande al ĉielo. Tiam bonaodoro de la vino ekodoris. Strange en la rivero fluis multe da ruĝa vino.

Ne nur tio, sed ankaŭ la tri fratoj, kiuj kredis ĝis tiam ke ili staras sur riverdigo, staris en la mezo de granda fabriko. En la fabriko multe da laboristoj respektive laboris aŭ por enboteligi vinon aŭ por glui etiketon aŭ por enpaki, kvazaŭ ili laborus pelate de tasko.

Baldaŭ la pastro diris kun milda rideto.

“Mi donos al vi ĉi tiun fabrikon, de hodiaŭ vi laboru kiel mastro de la fabriko. Ĉu vi estas kontenta?”

“Jes, kompreneble mi kontentiĝas.”

La pliaĝa frato respondis kvankam li ankoraŭ ne komprenis bone detale.

Parto 3 (laŭ Nakagaŭa Teruo)

La pastro trankvile forlasis ĉi tiun vinfarejon kun la restintaj du fratoj.

Post iom da tempo, ĉi tiun fojon ili alvenis tre vastan ebenaĵon kies limo ne estas videbla. Plie, la ebenaĵo ŝajnis tute blanka pro kolomboj kiuj amase descendis tien. La amaso de kolomboj ŝajne estis elmigranta ien ĝuste de nun.

La dua frato, kiu donacis piron al la almozulo en la dua tago, alrigardis tiun amason de kolomboj sen palpebrumo. Tiam la pastro metis manon ĝentile sur lian ŝultron kaj demandis:

“Kion vi volas?”

“Nenion mi volas. Sed se ĉiuj el amaso da kolomboj estus bovoj aŭ ŝafoj senescepte eĉ unu, kaj se ĉiuj el ili estus tute miaj posedaĵoj...”

La dua frato respondis silente rigardante supren la pastron.

“Jes!”

La pastro diris kun rideto, kaj krucosignis per longa bastono kiel antaŭe. Tiam, la okuloj de la fratoj estis ravataj kvazaŭ iliaj okuloj estus kovrataj de roso, kaj objektoj kiuj ĝis nun certe estis kolomboj fariĝis blankaj ŝafoj aŭ nigraj aŭ makulitaj bovoj.

Estis ne nur tiel. Tie, bonega granda fabriko estis ĝuste konstruita, kiu laŭamasigas kiel monto ne nur lakton, buteron, fromaĝon, sed ankaŭ eĉ harojn de ŝafoj.

“Jen, ĉio estas via posedaĵo. Ĉu vi estas kontenta?”

“Jes, certe kontenta. Sed ĉu vere tio ĉi estas mia?”

“Estas tute vere.”

(daŭrigota)

